BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

**BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL**

CGC Nº
00406 504/1000-06

**PRESIDÊNCIA**
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

**SECRETARIA**
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 242-5211
70.000 – Brasília (DF)

**JANEIRO DE 1980** **ÓRGÃO OFICIAL DO BKE** **BOLETIM Nº 51**

**Redação: MARIA ALMADA**

## NOVA OFICEJO DE UEA

La Universala Esperanto-Asocio malfermis novan oficejon en Novjorko pòr prizorgi la rilatojn kun la Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi celas elmontri la praktikan utilecon de la internacia lingvo.

Ek de novembro lastjare dudekpersona laborgrupo agadas en Novjorko sub la prezido de D-ro Tonkin. Tiu nova oficejo troviĝas en granda oficeja domo, vidalvide al la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj, informis nin D-ro Tonkin en sia letero de la 10-a de decembro 1979.

La ejo estis inaŭgurita per du festoj. la unua okazis la 13-an de decembro. La invititoj estis la oficistoj de la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj kelkaj reprezentantoj de landaj ambasadoj. La dua okazis la 15-an de la sama monato je la Zamenhofa Tago kaj la invititoj estis la lokaj geesperantistoj.

La ĉefa tasko de la direktorino, Jackye Mc Aloon estas trovi la rimedojn por sekurigi la daŭran vivon de tiu nova iniciato. Ĉar la oficejo postulas novajn elspezojn, oni fondis Societon de Amikoj de Novjorka Oficejo, kies apogantoj pagas US$ 100,00 dolarojn jare kaj ordinaraj membroj pagas US$ 10,00 dolarojn jare.

Kiu deziras helpi la novan oficejon volu sendi la monon al UEA menciante ĝian destinon. Estas eble aliĝi al Societo Zamenhof, kies prezidanto estas D-ro Humphrey Tonkin. La kotizo por la nuna jaro estas Kruz. 1.000,00.

## KONGRESO EN JUIZ DE FORA

La 4-an de januaro, 1980, kunsidis en Juiz de Fora (MG) la L.K.K. por pritrakti la eventon, promociitan de Brazila Konsilantaro de Esperanto.

Estis decidite, ke ĝi estu nomita "1-a Nacia Kongreso de Esperanto", havante la temon "Kunlaborado".

Pro la 66-a Universala Kongreso okazonta en Brazilo, la unuan fojon en la Suda Hemisferio, ni ĉiuj klopodu kunlabori. Kune ni kapablos fortigi la movadon kaj pro tio la kunlaborado estas nepre necesa.

La prelegoj promesas esti tre utilaj. Pluraj, jam bone konataj gesamideanoj kunlaboros por briligi la eventon.

La kongresa komisiono celas kuraĝigi la ĝis nun ne aktivajn anojn de nia movado, prelegi kaj aktive partopreni la debatojn. Novaj fortoj estas dezirindaj kaj ni kalkulas je la apogo de ĉiuj.

Personoj, kiuj pro ia ajn motivo ne povas partopreni, estas petataj aliĝi al la kongreso, ĉar tiamaniere helpos al ni pagi la saldon de nia ŝuldo rilata al nia sidejo aĉetita en Brazilja, kaj helpi al Esperanto-Asocio Kultura de Juiz de Fora, kiu ankaŭ intencas aĉeti sidejon.

Kunlaboru ni! Unuiĝo estas forto!

## DANKE NI RECIPROKAS

La redakcion atingis granda nombro da leteroj. Niaj gesamideanoj deziras al ni prosperan Novjaron. Bedaŭrin-

de ne eblas respondi al ĉiuj aparte. Ni dankas la bondezirojn kaj kore reciprokas ilin al ĉiuj.

**KAMPANJO POR LA SIDEJO**

Laŭ informo de nia Direktoro pri Financo, ni kolektis la jenajn sumojn dum la pasinta jaro 1979-a:

| | |
|---|---|
| En la unua semestro . . . Cr$ | 128.000,00 |
| Dua semestro . . . . . . . . . | 105.000,00 |
| Tuto . . . . . . . | 233.000,00 |

Novaj kontribuintoj:

| | |
|---|---|
| Onésimo Faria . . . . . . . . . . . | 600,00 |
| Antonio P. Soares . . . . . . . . . . | 1.000,00 |
| José Dias Pinto . . . . . . . . . . . | 3.500,00 |
| Banco do Brasil S/A . . . . . . | 20.000,00 |
| Ĝis nun . . . . . Cr$ | 258.100,00 |

---

La akiro de la sidejo de BKE en Brazilja estas unu el la plej bonaj atingoj de la Konsilantaro en la jaro 1979-a.

En la kampanjo por aĉeti propran sidejon elstariĝis s-ano Carlos A. Siqueira da Cunha, financa direktoro de la organizaĵo pere de sia korekta kaj fruktodona laboro.

Kune kun la ĝenerala sekretario, Nelson Pereira de Souza, ambaŭ klopodis realigi la revon de ni ĉiuj: havigi kulturan centron en nia ĉefurbo.

Restas ankoraŭ la ŝuldo de Cr$ 136.000,00; sumon, kiun, ni estas certaj, s-anoj Cunha kaj Souza, helpe de ni ĉiuj finpagos.

La jaro 1980-a alportos al nia movado gravajn ŝanĝojn, ĉar ni estas preparantaj la historian 66-an Universalan Kongreson en Brazilja.

**MONO RICEVITA POR LA BULTENO**

Ni dankas la jenajn donacojn:

| | |
|---|---|
| Anonimulo . . . . . . . . . . . . | 200,00 |
| Manoel Moacir Siscati . . . . . . | 150,00 |
| Carlos A. S. Cunha . . . . . . . . | 500,00 |
| Fernanda M. Aquilera . . . . . . | 200,00 |
| Gilberto A. Silva Velho . . . . . . | 400,00 |
| Lair A. Moreira . . . . . . . . . . | 200,00 |
| Lauro J. de Oliveira . . . . . . . . | 100,00 |
| Lacorday Andrade . . . . . . . . | 700,00 |
| José Dias Pinto . . . . . . . . . . | 800,00 |
| Hersila Valverde . . . . . . . . . . | 200,00 |
| Eluisio B. Rodrigues . . . . . . . . | 100,00 |
| Balbina Ferreira . . . . . . . . . . . | 200,00 |
| Alberto Flores . . . . . . . . . . . | 600,00 |
| João Andrade . . . . . . . . . . . | 1.000,00 |
| Amaro Pinangé Soares . . . . . . . | 65,00 |
| F.S.Almada (libroj v.) . . . . . . . | 260,00 |
| Claudio Zimmermann (2) . . . . . | 300,00 |
| Sumo . . . . . . . . | 5.975,00 |

**I-A NACIA KONGRESO DE ESPERANTO**

Juiz de Fora (MG) - Enskribiĝis ĝis la 10-a de januaro la jenaj gesamideanoj: Nº 10 - Luiz Teixeira da Silva, 11 - Francisco Rodrigues M. Sobrinho, 12 - Mozar Alves de Andrade, 13 - Wilson Souza Andrade, 14 - Antonio Rodrigues da Silva, 15 - Ursula Grattapaglia, 16 - Giuseppe Grattapaglia, 17 - Nydia A. Krieger, 18 - Yvone A. Krieger, 19 - Gilberto A. Krieger, 20 - Carlos S. Dionisio, 21 - Zacarias Andrade, 22 - José Dias Pinto, 23 - Amélia Dias Pinto, 24 - José Marcilio Filho, 25 - Francisca Martos, 26 - Elvira Fontes, 27 - Fernanda Marcos Aquilera, 28 - Walter Francini, 29 - Rosa R. da Silva, 30 - Nelson Silveira, 31 - Senhora Nelson Silveira, 32 - Hersila Valverde, 33 - Pedro Roman Sanches, 34 - Eluisio Bueno Rodrigues, 35 - Angela B. del A. B. Rodrigues, 36 - Manoel Blaz Garcia, 37 - Lanoy Dorin, 38 - Balbina Ferreira, 39 - Alberto Flores.

**GAZETOJ RICEVITAJ**

"Suda Stelo", Bulteno de A. Pernambucana de Esperanto, Diário Popular, Ŝak-Bulteno, N. H., Gazeta da Bahia, Correio Fraterno do ABC, Bulteno Alagoano, D. C., A Candeia, Folha de Caçapava, O NO.SSO, Diário Popular de Pelotas, Rio Grande, Hora da Verdade, Agora, Kvatera Esperantisto, Budho kaj la Moderna Homo, O Caminho, Jornal de Jundiaí e A Voz da Cidade.

**MOVADO EN BRAZILJA**

En la 8-a de decembro pasinta je la 20-a horo, en la provizora sidejo de Esperanto-Asocio Brazilja okazis disdono de diplomoj al 30 gelernintoj ĉe Universitato CEUB, kie prof-ro Nelson Pereira de Souza estis la kursgvidinto, dum la ĉiumonata festeto de EAB kun manĝaĵetoj kaj trinkaĵoj.

En la 14-a de la sama monato je la 17-a horo. - Estis granda festo ĉe la Japana Ambasado, kiam la Kultura Ataŝeo transdonis al la gvidantoj kaj al la 18 geknaboj de Bona Espero 2 ĉarmajn pupojn ofertitajn de la japana registaro ĉe la Universala Kongreso en Lucerno, kiel simbolon de la Internacia Jaro de la Infanoj kaj de la internacia frateco. Ĉeestis la estraro de Esperanto-Asocio Brazilja, LKK--anoj, la Prezidanto de Komerca Federacio, D-ro Newton Rossi (granda simpatianto de Esperanto); tiu ĉi lasta faris belan paroladon pri la okazaĵo kaj pri Esperanto mem, responde al la saluto de la Ataŝeo. Gazetaro, TV kaj Radio bone raportis pri la afero.

En la 15-a de decembro je la 20-a horo, en la sidejo de EAB ĉe la disdonado de diplomoj al 10 kursfinintoj de la spiritisma centro SEAE, kie s-ano Josias F. Barbosa estis la instruanto, okazis nova festeto kun la ĉeesto de Ges-roj Grattapaglia kaj geknaboj de Bona Espero, kiuj kantis en la arta programo aranĝita de BEJO, kies prezidanto, S-ano Fabricio Valle, venis el Gojanio.

**PRI 1979 (Mallonge)**

**São Paulo (SP)** - APE, kies prezidantino estas prof-ino Elvira Fontes, organizis dum la tuta pasinta jaro tri regionajn renkontiĝojn en: Promissão (SP), São Paulo (SP) kaj Rio Claro (SP). Ĝi okazigis 13 prelegojn ĉe lernejoj kaj diversaj fakultatoj. Gvidis konstantajn esperantajn kursoj kun la jenaj kunlaborantoj: Francisca Martos, Nelson Siveira krom la prezidantino mem, Elvira Fontes. Okazis konkursoj pri poeziaĵoj kaj ŝakludo.

Funkcias senĉese koresponda kurso, libro-vendejo kaj propagando pri Esperanto en "Diário Popular" kaj aliaj periodaĵoj. Ĉiu lasta sabato de la monatoj okazas kulturkunveno, cetere gvidata de prof-ro José Dias Pinto, kiu instruis en Fakultato de Santo André (SP).

Prof-ro D-ro Walter Francini faris plurajn festparoladojn okaze de diversaj kunvenoj. La 15-a de decembro, tago de Zamenhof, estis memorigita kun granda festo.

**Guarulhos (SP)** - Okazis propaganda prelego pri Esperanto ĉe la Jura Fakultato je invito de la eminenta prof-ro Fernandes Soares. Prelegis f-ino Elvira Fontes kaj D-ro Lacorday Andrade.

**Caçapava (SP)** - S-ano Majoro Gilberto A. Silva Velho, vicprezidanto de BKE, informas pri sia malavara kunlaborado porespiranta: en la pasinta jaro: li disendis 1760 leterojn. Propagandis en revuoj 6-foje. Kunlaboradis kun 26 gravaj gazetoj tra la tuta lando. Disdonis informojn pri la esperanta movado en tri urboj fare de radio. Li kontaktis la plej grandan nombron da deputitoj kaj guberniestroj tra la lando; 64 fojojn li vojaĝis al aliaj urboj por propagandi kaj informi pri Esperanto. Li havas propagandmaterialojn el 30 landoj por ekspozicio, kion li organizas tra la lando. En Caçapava li estas la plej ofte aktiva korespondanto kaj jam gajnis premion (arĝenta plaketon) de la loka poŝtoficejo, ĉar li elspezas la plej multe en tiu urbo pri korespondado. Laŭdinda kaj imitinda laboro! Gratulon!

**Jundiaí (SP)** - Laŭ informo de s-ano Silva Velho en ĉi tiu urbo, la 7-an de decembro finiĝis la Esperanto-kurso organizita de la urbestrejo, ĉe la "Academia Juvenil de Letras". Poste estis enpostenigita la direktoraro de la Jundiaí Esperanto-Grupo: Prezidanto: D-ro Ilton Arnaldo de Abreu Arruda; vicprezidanto: Mario Mazzuia; sekretariino: Maiza Lopes; kasisto: Ludovique E. Machado; kontrola konsilantaro: Helena de Souza, Oswaldo Cruz kaj Marcos Antonio Lopes.

**Barra Mansa (RJ)** - BAMEK - Barra Mansa Esperanto-Klubo estas unu el niaj plej bone organizitaj societoj. La familio Deslandes kune kun grupo de aktivaj gesamideanoj konstante instruas la internacian lingvon kaj bone propagandas pri nia movado en lokaj gazetoj. La juna s-ano Pedro Albeirice da Rocha skribis infanajn rakontojn en la ĵus eldonita "Coletânea de Contos Infantis", kiun eldonis "Conselho Municipal de Cultura" en Barra Mansa por la Jaro de la Infanoj. Gratulon!

**Volta Redonda (RJ)** - Nia vicprezidanto Inĝeniero D-ro Alberto Flores informas, ke en la pasinta jaro okazis 3 esperantaj kursoj en tiu industria urbo. La unua estis en la sidejo de la societo "Caminho da

Luz", gvidita de la juna s-ano Marcos Bailão, kiu ĉiu dimanĉe sindediĉas al instruado de kolegoj pri la internacia lingvo. Li lernis Esperanton en la jaro 1978-a kaj en la skvanta jaro – 1979-a, jam estas instruanta ĝin, kaj la grupo progresis.

Laŭdinda agado! Antaŭen Marcos!

La dua kurso estis gvidita de la sindona prof-ino Fortunata Mattiazzo, ĉe elementa lernejo "Luiz Castanhede". Estis ŝiaj kunlaborantoj la geprof-roj Ielen Tavares kaj sia edzo D-ro Mario Tavares. La lecionoj daŭras ankoraŭ.

La tria kurso estis organizita de D-ro Alberto Flores, ĉe la Filozofia Fakultato de Volta Redonda. La Esperanto-kurso estis aprobita de la Estraro de la Fakultato. Ĝi daŭris 50 horojn, kaj la atestoj pri partoprenado en ĝi estis subskribitaj oficiale de la direktoro de la Filozofia Fakultato.

S-ano Alberto Flores ĉiusemajne aperigas artikolojn pri la Esperanto-movado landa kaj internacia en la gazeto "Sul do Estado". Aperis en la jaro 1979 46 artikoloj, dank' al la direktorino prof-ino Heth Lustosa da Cunha Bastos, kiu aperis propagandaj artikoloj pri la internacia lingvo Esperanto.

"En Volta Redonda nia samideanaro persiste fosas aian sulkon" konkludis nia informanto.

<u>Rio de Janeiro (RJ)</u> - De la Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz ni ricevis liston de la libroj ĝis nun eldonitaj en la jaroj 1976 ĝis 1979, inter kiuj troviĝas multaj, kiuj estas rekomendindaj, sed ni ne havas sufiĉe da spaco por nomi ilin, sed ni konsilas al interesatoj sin turni al tiu societo laŭ la adreso – Caixa Postal Nº 3133 - 20.000 - Rio de Janeiro (RJ) petante pliajn informojn.

Kune kun la sama sciigo ni ricevis ankoraŭ la informojn pri Bilanceto de la kavara semestro, t.e.: **Enspezo:** Anataŭa saldo Cr$ 10.572,18; Kotizoj: Cr$ 2.313,35; Libroj: Cr$ 4.039,12; Fonduzo Iŝmael Gomes Braga: Cr$ 24.000,00; Fonduzo Porto Carreiro Neto: Cr$ 2.000,00. **Elspezo:** Cirkuleroj: Cr$ 180,00; Poŝtmarkoj: Cr$ 1.716,90; Libroj aĉetitaj: Cr$ 16.128,12; Libroj eldonitaj: Cr$ 20.000,00; Posta saldo: Cr$ 4.888,63. Sumo: Cr$ 42.923,65. Subskribo de Nelson Afonso, Direktoro Superintendanto. Délio Pereira de Souza, Direktoro Administranto. Affonso Borges Gallego Soares, Direktoro Financisto.

<u>Salvador (BA)</u> - Nia kunlaboranto s-ano Sergio Luiz Silva Santos informas nin, ke la Societo aktive progresis kaj daŭrigas la instruadon de la internacia lingvo, ne nur en la societejo, sed ankaŭ en diversaj fakultatoj.

La 14-an de decembro omaĝe al la Zamenhofa Tago, BEA-Bahia Esperanto--Asocio disdonis trofeon "Hermes Pitta" al la geinstruistoj kaj kelkaj aliaj personoj, kiuj laboris favore al Esperanto.

Nia juna vicprezidanto skribis, ke s-ano Hermes Pitta, kiu forpasis la 8-an de majo de 1978, multege helpis BEA'n kaj la progresigon de Esperanto en nia lando. S-ano Pitta instruis la internacian lingvon al multaj konataj esperantistoj inklusive al nia neforgesebla Nid Dutra de Amorim kaj aliaj.

La 21-an de decembro Bahia Esperanto-Asocio okazigis kunfraternigan vespermanĝon. Estis invititaj pluraj geinstruistoj, gelernantoj kaj simpatiantoj de Esperanto. BEA jam organizis novajn kursojn por la kuranta jaro en kiujn jam enskribiĝis granda nombro da interesatoj, tiel ke oni havas 4 grupojn.

<u>Ilheus (BA)</u> - Prof-ro Eleus Leonardo de Sá informis, ke la guberniestro Antonio Carlos Magalhães deklaris la Grupon Esperantistan de Ilheus, de publika utileco, kion publikis la gazeto "Diário da Tarde".

Nia vicprezidanto Eleus gvidas kursojn en sia urbo kaj bone propagandas pri Esperanto en diversaj naciaj gazetoj, inter kiuj "Diário do Cacau".

<u>Recife (PE)</u> - Pernambuka Esperanta Asocio en la pasinta jaro organizis kursojn. Laŭ la sciigo lernis Esperanton ĉirkaŭ 100 gelernantoj.

La organizaĵo posedas librovendejon kaj daŭre aktivas en la movado.

<u>Fortaleza (CE)</u> - Prof-ro Paulo Amorim Cardoso organizas kaj gvidas kursojn ĉe la Federacia Universitato de Ceará. Same li konstante gvidas korespondan kurson. Pasintjare li eldonis libreton por propagandi pri Esperanto sub la titolo "A Torre

de Babel", vendata je Cr$ 30,00. Oni povas mendi tiun libron laŭ la adreso lia: Caixa Postal Nº 1221 - CEP 60.000 - Fortaleza (CE).

**Bauru (SP)** - Kiel ĉiam la bauruanoj laboras senĉese por disvastigi la Internacian lingvon en pluraj medioj. En 1974 pere de Komunuma Leĝo sub Nº 1848 estis deklarita de publika utileco la Baurua Societo de Esperanto.

Nuntempe ĝi serioze klopodas aĉeti propran sidejon. Ĉe la fino de 1979 ili jam havis la sumon ĉikaŭ Cr$ 90.000,00. Laŭdinda laboro indega je helpo.

La organizon vizitis multaj enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Aktiva kaj progresema estas la anaro el Bauru, ĉar ili apogas la movadon en ĉiuj cirkonstancoj kaj pere de ilia ĉeesto brilas la eventoj. S-anoj Euclydes Geraldo de Carvalho kaj Ivon Barbosa faris bonegajn prelegojn dum la regionaj renkontiĝoj. Laŭdinda agado!

Prof-ro Antonio João Fraga Padilha sendis al ni filatelaĵojn eldonitajn por la 15-a de decembro en Bauru. omaĝe al la 30-a datreveno de la "Escola Progresso", kion ni kore dankas.

La esperantistoj promiciis kaj realigis filatelan montron en Bauru okaze de la Zamenhofa Tago.

Kiu deziras akiri la valorajn filatelajn stampojn volu sin turni al "Sociedade Bauruense de Esperanto", rua 13 de Maio, 20 - 30, CEP 17.100 - Bauru (SP).

La kovertoj kun stampo estas vendataj je Cr$ 25,00.

**Porto Alegre (RS)** - De niaj kunlabotantoj el tiu urbo ni ricevis gazeteltranĉaĵojn el "Correio do Povo" kun foto de la vizitintoj al ĝia redaktejo.

La esperantistoj estis intervjuitaj okaze de la vizito de prof-ro Sylla Chaves, prezidanto de BEL al tiu urbo.

Sur la foto aperas s-ino Zeluy Seleme, sam-ino Nydia Krieger, s-anoj Armando Trarbach, Sylla Cahves, Modesto B. de Abreu, Manoel T. de Abreu, Julio R. Moreira kaj Carlos Henrique Dionísio.

La artikolo estas bona propagandilo por nia movado. Ĉiu sabate okazas rondo de "verda kafo", kiam la portalegranoj praktikadas la lingvon.

Por plibonigi la propagandon ili eldonas la informilon "Suda Stelo", kiu aperis lastatempe, kies redaktoro estas nia vicprezidanto D-ro Ivo Sanguinetti. S-ano Modesto Belmonte de Abreu vaste informas nacilingve por Esperanto, kaj la gazeto rifuzis aperigi liajn verkojn, li fondis novan nacilingvan gazeton sub la titolo "Folha Livre" kaj solvis la problemon.

Interalie li skribis: "Antaŭ ol fini ĉi leteron, ĝoje mi transdonas al vi kaj la tuta estraro de BKE la plej varman feliĉigon pro la akiro de propra sidejo por BKE". Ni dankas la afablajn vortojn kaj lian helpon.

**Rio Grande (RS)** - D-ro Manoel Torres de Abreu vigle agadas kune kun s-ano Dirceu Porciuncula kaj aliaj gesamideanoj en Rio Grande kaj ekster ĝi.

Ni ricevis la gazeton "Rio Grande" kaj "Agora" el Rio Grande kaj "Diário Popular" el Pelotas, kiuj aperigis valorajn artikolojn pri Zamenhof, Esperanto kaj nia landa kaj tutmonda movado.

S-ano Porciuncula siavice sciigas, ke finiĝis la kursoj pri Esperanto kaj la 15-an de decembro okazis solena festo en la Riograndana Biblioteko.

Dum la soleno parolis la novbakitaj esperantistoj elmontrante sciipovi la internacian lingvon. La festparolado de la prezidanto de la organizaĵo, D-ro Manoel Torres de Abreu, Jurandir I. Bandeira, Edson da Silva Gobbi, Marco Antonio Lareto, Roberto Valentim kaj João Lima ricevis diplomojn.

**S. Sebastião do Caí (RS)** - S-ano Otto Vaske, per inteligenta propagando sukcesas disvendi la libron "Esperanto Elementar", de F. S. Almada, helpante al ni la eldonadon de nia Informa Bulteno. Jam kelkdekoj da libroj estis venditaj dank'al liaj anoncoj en diversaj gazetoj kaj periodaĵoj.

S-ano Vaske esprimis sian ĝojon pro la akiro de la propra sidejo de BKE. Li skribis: "La lasta Bulteno alvenis. Mi protestas pro tiom da ĝojigaj novaĵoj, ĝi fariĝis tro mallonga! . . . Li sendis al ni gazetojn N. H. kaj "Jornal Vale dos Sinos", kiuj aperigas artikolojn de li redaktitajn pri Esperanto. S-ano Vaske petas, ke ni publikigu la jenan:

"**ANONCO** - Oni klopodas trovi flue Es-

perant-parolant(in)on, kiu favore luos meblitan dormoĉambron (prefere nedependan. Ne kondiĉo), bone lumigatan, senbruan, dum unu monato, al samideano devigata plenumi laborigan tajplaboron. Ofertojn kaj kondiĉojn BV sendi al sinjoro Vaske. Adreso: Rua Esperanto S/Nº. CEP 95.760 - Caí (RS). Prefero falos sur ebla oferto de fremdlandano loĝanta en Brazilo".

## GRATULLETEROJ RICEVITAJ

De niaj s-anoj Delio Pereira de Souza kaj Claudio Zimmermann ni ricevis tre afablajn gratulojn pro la aĉeto de nia propra sidejo en Brazilja.

Sorocaba (SP) - La Radio Sorocaba jam de multaj jaroj apogas Esperanton kaj Elsendadas programon pri ĝi.

La membroj de la societo klopodas aĉeti propran sidejon kaj vendas "brikojn" je Cr$ 250,00. Ĝi eldonas dulingvan bultenon senpage kaj aktive partoprenas en ŝtata kaj landa movado.

La grupo de gesamideanoj okazigis kelkajn regionajn renkontiĝojn en tiu progresema urbo.

Por komenci la jaron 1980-an okazis tie la Junulara Renkontiĝo.

Imitinda agado! Ili certe sukcesos.

Bedaŭrinde ni ne havas informojn el ĉiuj urboj, kie grupoj kaj unuopuloj agadas, pro tio ne eblas mencii ilin.

Tamen fine de la jaro 1979-a ni konkludas, ke la pasinta jaro estis pozitiva por nia movado.

La jaron 1980-an ni komencu kunlaborante sur ĉiuj kampoj. Estas nia tasko organizi kursojn, rekruti novajn individuajn membrojn al UEA kaj serioze nin prepari por la 66-a UK en Brazilja en 1981-a.

Natal (RN) - La 1-a Nordorienta Renkontiĝo en la pasinta jaro estis organizita de la Potigvara Esperanto-Asocio, promociita de BEL, en tiu belega urbo.

Juiz de Fora (MG) - Reaktivis la Esperanto Kultura Asocio de tiu urbo en la pasinta jaro. En aprilo 1980 ĝi fariĝos la kongresurbo de la 1-a Nacia Kongreso de Esperanto promociita de Brazila Konsilantaro de Esperanto.

João Pessoa (PB) - Laŭ informoj de s-ano Silva Velho, en la pasinta jaro la Esperanto-Asocio de João Pessoa organizis kursojn en lernejoj. Ankaŭ la grupo de la skoltoj tie vigliĝas.

Maceió (AL) - S-ano Alves Mata reorganizis la societon helpata de progresemaj gesamideanoj. Okazis prelegoj en pluraj lernejoj, kaj poste li organizis kursojn kaj daŭre propagandas pri la movado.

Curitiba (PR) - Okaze de la Tago de Zamenhof la Paraná Esperanto-Asocio disdonis diplomojn al la kursfinintoj. Tiam prelegis prof-ro Geraldo Mattos kaj Robinson Mattos. D-ro Gert Drucker, prezidanto de PEA dankis al s-ro Raul Gabardo, mastro de TAU hotelo (Rua Monsenhor Celso, 250, en Curitiba), la permeson, okazigi la kursojn en la salono de la hotelo, kun kafo al esperantistoj. Kunlaboris s-ino Deyse Mattos, Vera Diniz kaj Salvador Raymundo.

S-ano Olsen Bento da Cruz vendas "Esperanto Elementar" por helpi la eldonon de nia Bulteno. Interesatoj turnu sin al li, utiligante "Caixa Postal Nº 8614, CEP 80.000 - Curitiba (PR).

## NOVA VICPREZIDANTO

Por la fako "Propagando kaj Instruado" de Esperanto estis nomumita vicprezidanto de BKE, laŭ propono de Majoro Gilberto A. Silva Velho, lia kunlaboranto Roberto Gomes Freitas, el Jundiaí (SP).

Vitória (ES) - Unu plia organizaĵo fariĝis konsistiganto de BKE. Temas pri la Kapiŝaba Esperanto-Asocio, el Vitória, kies prezidanto estas nia s-ano Gilson Villas Boas Passos. Ni kore dankas lian kunlaboradon.

## NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
**Boks 942, OSLO 1, Norvegujo**

### Postkongreso en Oslo 1980

Norvega Esperantista Ligo invitas al postkongreso en la bela norvega ĉefurbo Oslo dum la tagoj 10-a ĝis 12-a de Aŭgusto 1980.

La ampleksa programo de la 3-taga restado en Oslo rakontas pri allogaj eks-

kursoj al la vidindaĵoj de Oslo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ekz. vizitoj al la Urbodomo, la Folklora Muzeo, la Vikingaj ŝipoj, la polusesplora ŝipo "Fram", la flosoj "Kon-Tiki" kaj "Ra" (kiujn uzis Thor Heyerdahl en siaj ekspedicioj), al la fama skisaltejo Holmenkollen kun grandioza panoramo, ŝipekskurso sur la bela Oslo-fjordo kaj al la muzeo de la mondkonata pentristo Edv. Munch.

Cetere okazos Distra Vespero kaj renkontiĝo kun norvegaj esperantistoj ĉe festena tablo. Kongreskotizo: norv. kr. 100. Prezoj por hotelo, ĉiuj manĝoj kaj ĉiuj ekskursoj sumiĝas je nur norv. kr. 800 (rabato por infanoj ĝis 15-jaraj kaj por blinduloj).

Limdato por aliĝo: la 1-an de Julio 1980; sed ĉar la lokoj estas limigitaj, estas rekomendinde aliĝi laŭeble baldaŭ. Aliĝiloj riceveblaj de: Postkongreso en Oslo, Boks 942, OSLO 1, Norvegujo (kun kompleta programo).

- x - x - x - x - x - x -

**Niterói (RJ)** - Informações do Dr. Joaquim do Couto:

**"O Esperanto é uma linguagem de idealistas"** - Esta, a declaração de Jack Le Puil, a um jornalista inglês, depois de ter cantado, em um Café-Concerto de Paris, três canções em Esperanto. Ao referido jornalista, deu aquele cantor, longa entrevista, na qual, interferindo sua mulher, senhora Armelle, declarou ter estudado o Esperanto por razões matrimoniais e também em virtude de sua participação nos programas artísticos, e disse ainda – que sua filha é estudante de Esperanto para que possa usá-lo em convenções internacionais.

Prova essa manifestação que caminhamos para o uso do Esperanto, como a segunda Língua de todos os povos.

**Santos (SP)** - Kun granda malĝojo ni komunikas la forpason de Rosely Almada Prado, 20-jaraĝa filino de Helena Almada Prado, nepino de nia prezidanto, kio okazis la 22-an de ĉi tiu monato pro akcidento.



**Sur la foto estas, de maldekstre: S-anino Fanny Dupré, Maria Almada kaj Guimar A. de Aquino, okaze de la intervjo farita de la ĵurnalisto de Svisa Radio, en Lucerno.**

**Fotografaĵo farita de S-ano João Masiero.**

## POETO KANTAS

**de "dokito"**

Poeto kantas, ĉiam, dum krepusko,
Je hor' de meditad' kaj resopiro!
Kiam pasio brulas en la brusto
Kaj en l' animo blekas la deziro! . . .

Poeto revas, ankaŭ en mateno,
Por versojn teksi al amatin' kara . . .
Dum lin atingas de la tago – beno –
La sunradioj por la viv' amara . . .

Poeton ravas la lunlum' arĝenta,
En kampara kvieto kaj tenere;
Ankaŭ lin ravas susurado venta
En tiuj noktoj plenaj de mistero! . . .

Poeto kantas, kiam sur la montoj,
Li spiras forte kun pli da kuraĝo.
Aŭdante bruon de fluantaj fontoj,
Ekstazigita antaŭ la pejzaĝo! . . .

Kaj sur kamparo, floroj odorantaj! . . .
Lin miregigas la naturaj birdoj . . .
Ardeoj blankaj sur l' aer' flugantaj,
Kantoj, triladoj de la buntaj birdoj!

Kaj la ĉagrenoj, kiam lin atingas,
Poeto kantas kun bedaŭra sento
Kaj lia brusto pro premado svingas,
Kaj liajn kantojn-forkondukas vento!

# CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

CGC 00 406 504/001 06 – Brasília

## BALANÇO GERAL
## Em 31 - 12 - 79

### ATIVO

| | | | |
|---|---|---|---|
| I – **Disponível** | | | |
| CAIXA | 2.174,86 | | |
| BANCOS | 35.416,86 | Cr$ | 37.591,72 |
| II – **Realizável** | | | |
| BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO | | | 860,00 |
| III – **Imobilizado** | | | |
| IMÓVEIS | 320.000,00 | | |
| MÓVEIS E UTENSÍLIOS | 16.200,00 | | 336.200,00 |
| | | | 374.651,72 |
| IV – **Compensação** | | | |
| PROMESSAS E REGISTRO DE DONATIVOS - SEDE PRÓPRIA | | | 336.000,00 |
| | | | 710.651,72 |

### PASSIVO

| | | | |
|---|---|---|---|
| I – **Não Exigível** | | | |
| FUNDO SOCIAL | | | |
| Ano Anterior | 9.087,41 | | |
| Incremento – 1979 | 213.963,61 | Cr$ | 223.051,02 |
| II – **Exigível** | | | |
| **A curto prazo** | | | |
| CREDORES POR SUMPRIMENTOS À CAIXA | 15.400,70 | | |
| TITULOS A PAGAR | 136.200,00 | | 151.600,70 |
| | | | 374.651,72 |
| III – **Compensação** | | | |
| DONATIVOS SOB COBRANÇA | 101.900,00 | | |
| DONATIVOS COBRADOS | 234.100,00 | | 336.000,00 |
| | | | 710.651,72 |

## DEMONSTRAÇÃO DA CONTA "LUCROS E PERDAS"

### DÉBITO

| | |
|---|---|
| – DESPESAS C/AQUISIÇÃO DE IMÓVEL | 6.700,00 |
| – DESPESAS C/CAMPANHA DA SEDE PRÓPRIA | 10.246,00 |
| – DESPESAS GERAIS | 25.590,63 |
| | 42.536,63 |
| Lucro do exercício, transf. p/Fundo Social | 213.963,61 |
| | 256.500,24 |

### CRÉDITO

| | |
|---|---|
| – CONTRIBUIÇÕES PECUNIÁRIAS, RECEBIDAS | 13.390,00 |
| – DONATIVOS PRÓ SEDE PRÓPRIA, RECEBIDOS | 234.100,00 |
| – RENDAS DE JUROS E DESCONTOS | 8.010,24 |
| – RENDAS DIVERSAS | 1.000,00 |
| | 256.500,24 |

Brasília (DF), 31 de dezembro de 1979

| | | |
|---|---|---|
| F.S. Almada | Nelson P. de Souza | Carlos A. S. da Cunha |
| Presidente | Secretário | Tesoureiro |
| | | Contador - CRC - DF.360 |

Centro de Cópias Cerqueira
Compôs e Imprimiu